# TEA-BULTENO

2ª JARO | MARTO 1999 | NUMERO 3

## AGENDO

| | | |
|---|---|---|
| **1** | L | Progresiga kurso |
| 2 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 3 | M | |
| 4 | Ĵ | |
| 5 | V | Ludkarta vespero: TRISEPO |
| 6 | S | |
| **7** | **D** | |
| 8 | L | Progresiga kurso |
| 9 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 10 | M | |
| 11 | Ĵ | |
| 12 | V | Tradukvespero |
| 13 | S | |
| **14** | **D** | |
| 15 | L | Progresiga kurso |
| 16 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 17 | M | |
| 18 | Ĵ | |
| 19 | V | Ĉiutaga vivo en karsta vilaĝo |
| 20 | S | |
| **21** | **D** | |
| 22 | L | Progresiga kurso |
| 23 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 24 | M | |
| 25 | Ĵ | |
| 26 | V | El la Esperanta gazetaro |
| 27 | S | |
| **28** | **D** | |
| 29 | L | Progresiga kurso |
| 30 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 31 | M | |

## Ordo en TEA-biblioteko!

Post jaroj kaj jaroj de baraktado klopode al akiro de definitiva enlistigado, katalogado kaj ordigado de centoj kaj centoj da eldonaĵoj, finfine nun ni povas deklari solvita tiun maldormigan problemon danke al Eraldo Sepulcri, kiu preparis por TEA programon, facile uzeblan kaj tute taŭgan por la bezonoj de bibliotekisto. Ĉia serĉado - laŭ titoloj, aŭtoroj, tradukistoj, genroj ktp ktp - tute ne kreos kapdoloron al la biblioteko-zorganto, ĉar ĉia prilibra informo, per simpla tuŝeto de alcela komputila klaveto, aperos surekrane, kaj... ĉio dezirata rapide je dispono.

Por interesatoj, ni donas kelkajn teknikajn klarigojn. Ĉi tiu programo por la mastrumado de asocia biblioteko estas je 16 bitoj por kongrui kun Win 3.1 La interfaco estas itallingva. La programo enhavas ĉiujn supersignitajn esperantajn literojn (ĉĝĥĵŝŭ) pere de makroo (Esplit.Rec). Ĝi kongruas kun Win 95 kaj Win 98, se jam instalitaj makro-koda registrumo (Recorder.Exe) kaj ties dosieraro (Recorder.dll), kiuj ne plu estas liveritaj de Win 95 aŭ Win 98. Nepras instali la karaktrojn ARIAL (ĉeestaj en ĉiuj vindozaj versioj) kaj E ARIAL (same farita de nia programisto Eraldo).

La datumoj estas enstokigitaj en iu Datumbazo (*Data base*) je formato *ACCESS* de *MICROSOFT* kaj oni povas ilin enmeti, nuligi, modifi kaj ordigi laŭ la diversaj indikoj. Eblas printi la elektitajn «slipojn» aŭ la tutan arkivitan materialon. Ekzistas aŭtomata kontrolilo por malebligi enŝovadon de jam enmetitaj donitaĵoj.

Por pliaj informoj kaj detaloj bv. skribi al TEA.

## Loke, pri pluretnismo

En la lasta februara semajno en Triesto okazis kvartaga kongreso, organizita de la itala sekcio *Sietar Europa* ĉe la ejoj de Komerca Ĉambro, kun la temo: «Unu komunumo kaj pluraj identecoj».

Reprezentantoj de la greka, hebrea, kroata kaj slovena komunumoj parolis pri sia «triestaneco» antaŭ pli ol cent kunvenintoj el diversaj eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj. Ili prezentis nian urbon kiel mikrokosmon de la nova Eŭropo kaj kiel ekzemplon sekvindan laŭlonge de vojo devige kondukanta al pluretnia integriĝo. Fakte tia estas la hodiaŭa realo kaj precipe tia estos la estonteco en la ĉiulanda socio.

Dum la kunveno oni proponis la eblajn solvojn por organizi sociojn kies ĉefa celo estu la paca kunvivado, en diverseco kaj reciproka respekto. Estis elektita ĝuste Triesto ĉar ĝiaj spertoj tiukampaj povas sugesti ion utiligeblan.

Ĉu io nova por ni esperantistoj?

## Tie kaj tie plukitante... Zorge de Elda Doerfler

### Komputilaj tradukistoj!

*(el PANORAMA (Panoramo) - Itala semajna magazino - 25.02.99)*

Ŝajne la problemo pri multlingveco estas pli tikla en interreto ol en la normala homa sfero, ĉar daŭre aperas novaj tradukprogramoj ene de ĝi. Nun estas la vico de LOGOS! Graslitera titolo tiel anoncas novan miraklan eblon transiri de unu lingvo al alia senprobleme: *LOGOS tradukas (senpage) en 102 lingvojn: kolosa vortaro en Interreto!* Ĝi entenas - laŭ la asertoj de la produktanto - 360 milionojn de vortoj. Kiel utiligi ĝin? Tutsimple alirante la TTT-paĝaron jenadrese: www.logos.it.

**LOGOS** estas firmao de Modena, urbo de norda Italio, kiu tradukservas al la tuta mondo, kun vendo de 20 miliardoj da liroj. La ideo, meti je ĉies dispono plurlingvan vortaron, naskiĝis antaŭ kelka jaro, duoblacele: doni praktikan avantaĝon al la publiko kaj fari rektan propagandon pri si grandskale. Laŭ onidiroj ĝi funkcias. Ĉiu vorto tradukeblas en 102 lingvojn: inter tiuj eĉ dialektoj, kiaj la veneta, sarda kaj baldaŭ la liguria. Oni povas trovi la malnovgrekan, jidan, zuluan, kroatan ktp-ajn lingvojn. Plie ekzistas por ĉiu verbo, eĉ en la latina kaj greka, la koncernaj konjugacioj. Do, mirinda puto el kiu ĉerpi la solvon al prolingvaj miskomprenoj. Sed ĝia eksterordinareco ne limiĝas je tio: en la **LOGOS**-ejo stokiĝas 10 mil libroj, tiel ke, se oni serĉas la signifon de iu termino, eblas ekscii en kiu kunteksto ĝi estas uzata.

La administrantoj de **LOGOS** (por la bono de la publiko!?!) elspezas ĉiujare proksimume du miliardojn da liroj. La renoviga laboro neniam interrompiĝas, ĉar daŭre oni enmetas vortojn, librojn, signifojn... kaj tute senprofito-cele. Ja, mecenata, grandanima entrepreno, kiu iel klopodas kontribui al la solvo de tutmonda diverslingveco. Certe indas vizito al tiu ejo, en kiu ankaŭ Esperanto povus plenrajte ludi sian rolon.

### Filatela Angulo

### CZ-poŝto denove propagandas Esperanton

La 1[an] de februaro ekfunkciis ĉe la poŝtoficejo en Strážnice afrankmaŝinstampilo propagandanta la «72[a] SAT-Kongreso - Karlovy Vary 24-31.7.1999». Ĝin oni uzos ĝis la 31[a] de julio, nome ĝis la fino de la aranĝo. Sur la bildo videblas artaj konstruaĵoj de la gastigonta urbo kaj, vertikale skribita, la vorto «La Espero». (Vd. ĉi-sube)

Jam tradicie, la projekton faris inĝ.ark. Karel Kuĉa; ĝin gravuris s-ro Karl Pavliĉek. Plian informojn vi povas ricevi ĉe la adreso: Esperanto - Pk. 36 - CZ-69662 Strážnice, distr. Hodonín Tel/fakso: +420/631/332507.




## Plej lastaj novaĵoj pri

## 11[a] Alp-Adria Esperanto-Konferenco

Medulin/Pula, Kroatio

30.09-03.10.1999

*Kulturaj rajtoj de etnaj malplimultoj en la Alp-Adria Komunumo*

**Tema parto**: Vivi en la Alp-Adria Komunumo, ne signifas nur ĝui la diversecon de la klimato kaj naturo, sed ankaŭ vivi en multkultura medio. En preskaŭ ĉiu regiono de tiu teritorio eblas renkonti pluretnismon. Kaj jen ekaperas demandoj: ĉu ni konas niajn alinaciajn najbarojn, samurbanojn, samlandanojn? Ĉu ni iam partoprenis en iu aranĝo organizita de ali-nacia komunumo? Ĉu ni iam pensis pri iliaj rajtoj? Al tiuj demandoj ni provos respondi dum la ĉijara Alp-Adria Esperanto-Konferenco.

**Konferenc-loko**: Medulin situas 10 km-ojn for de Pula, ĉe la marbordo. Ĝi estas konata pro la belaj plaĝoj. Pro la bela natura ĉirkaŭaĵo kaj aliaj vizitindaĵoj, krom la ĝenerala kunsido kaj laboroj pri la elektita temo, la programo antaŭvidas ekskursojn al la insularo Brijuni (Nacia Parko) aŭ al pluraj ĉarmaj istriaj urbetoj. Tiuperiode la temperaturo aera kaj mara estas inter 15 kaj 20 gradoj.

**Kiel atingi Medulin**:

* per urba buso el Pula (bushaltejo en Pula ĉe fervoj- kaj bus-stacidomo);
* Pula estas facile atingebla per buso, trajno, aviadilo kaj eĉ ŝipo.

Pluajn informojn kaj aliĝilojn donas TEA-sekretariino kaj la organizanto:

Kroata Esperantista Unuiĝo
p/a Sveti Duh 130
HR-10000 Zagreb, Kroatio
tel: +385 01 3745502 - Retadreso: hes@esperanto.nu

### Verda longmarŝo tra Jarcento *(el Ret-info)*

Ĉinaj esperantistoj estas piedmarŝantaj direkte al Roterdamo. La starto okazis de la urbo Lianyungang la 1[an] de januaro 1999 kaj la alveno en la cel-loko estos proksimume en aŭgusto 2000.

Oni iradas ĉiutage laŭlonge distancon de ĉ. 20 km. En ĉi tiuj du monatoj de marŝado oni devis elteni multajn malkomfortaĵojn kaj precipe malvarman temperaturon, eĉ 3-10-gradan sub la nulo. Sed oni ne perdis la dekomencan entuziasmon, kaj la deziro atingi la ĉefurbon de Esperantujo estas ilia plej granda antaŭenpuŝigilo.

### El Proverbaro Esperanta

Dion fidu, sed senfare ne sidu.

*Kiu semas venton, rikoltos fulmotondron.*

Peko kaj eraro estas ecoj de l'homaro.

*Apud plena manĝotablo ĉiu estas tre afabla.*

L.L. Zamenhof


BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

# MARTO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | 1<br>Holy | 8<br>Interncia festo de la virinoj | 15 | 22 | 29 |
| Mardo | 2<br>Purim-a Antaŭtago | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Merkredo | 3<br>Purim<br>Kodomonohi | 10 | 17 | 24 | 31<br>Antaŭtago de Pesach |
| Ĵaŭdo | 4<br>Purim | 11 | 18 | 25<br>Ramanavani | |
| Vendredo | 5 | 12 | 19 | 26<br>Halto de Pilgrimuloj en la ebenaĵo de Arafat | |
| Sabato | 6 | 13 | 20 | 27<br>Aid el kebir | |
| Dimanĉo | 7 | 14 | 21<br>Hindua novjartago (2055)<br>Nawroz | 28<br>Palmo-Dimanĉo | |


# MARTO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | 1<br>Holy | 8<br>Interncia festo de la virinoj | 15 | 22 | 29 |
| Mardo | 2<br>Purim-a Antaŭtago | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Merkredo | 3<br>Purim<br>Kodomonohi | 10 | 17 | 24 | 31<br>Antaŭtago de Pesach |
| Ĵaŭdo | 4<br>Purim | 11 | 18 | 25<br>Ramanavani | |
| Vendredo | 5 | 12 | 19 | 26<br>Halto de Pilgrimuloj en la ebenaĵo de Arafat | |
| Sabato | 6 | 13 | 20 | 27<br>Aid el kebir | |
| Dimanĉo | 7 | 14 | 21<br>Hindua novjartago (2055)<br>Nawroz | 28<br>Palmo-Dimanĉo | |

### 5759 Hebrea jaro

**2-4** - Purim. Gaja celebrado rememore de la okazintaĵoj rakontitaj en la libro de *Esther*, kiam la hebreoj, en Persujo, estis savitaj de amasbuĉado. Tiuokaze oni disdonas donacojn al amikaro kaj monon al malriĉuloj.

### 2559 Budhista Jaro

**3** - Kodomonohi ( Japanio). Festo de la infaninoj: en ĉiu familio, kie troviĝas infanino, oni pretigas persikfloran aranĝon kaj specon de altaro sur kiun ŝi metos siajn pupojn.

### 2054/5 Hinduisma jaro

**1** - Holy. Unu el la plej viglaj kaj popularaj festoj de Hindio kiu signas la finon de vintro kaj alvenon de printempo. Brua kaj bunta procesio trairas vilaĝojn kaj urbojn.

**21** - Hindua novjartago 2055. La datado komenciĝas ekde kiam la reĝo *Vikrama Era* enkondukis la kalendaron.

**25** - Ramanavani. Ĝi rememorigas la naskiĝon de la legenda heroa reĝo *Rama*, unu el la dek enkarniĝoj de la Dio *Vishnu*. Dum la antaŭa semajno oni legas kaj prezentas lian draman vivon. Je la festo-tagiĝo, post rita purigado en akvo, oni vizitas la templon.

### 1999 Kristana jaro

**28** - Palmodimanĉo (Anglikana, Evangelia, Katolika). Ĝi memorigas pri la eniro de Jesuo en Jerusalemon antaŭ la Pasiono. Ĉefmomento de tiu tago konsistas el bena ceremonio kaj procesioj kun olivo- aŭ palmo-branĉoj. Komenciĝas la «Sankta Semajno».

### 1419 Islama jaro

**26** - Halto de la pilgrimuloj en la ebenaĵo de Arafat. Speciala momento de la pilgrimado al Mekko (*Hagg*), la kvina pilastro de Islamo.

**27** - Aid el Kebir. Ĝi estas la plej grava festo de Islamo, kiu memorigas pri la miraklo farita de *Allah*, kiam li anstataŭigis per virŝafo la filon de Abraham, destinitan esti oferbuĉita. Sine de ĉiu familio oni kuiras tutan ŝafidon, kiu parte estas donita al malriĉuloj.

---

**8** - Internacia festo de la virinoj. Tiu tago simbolas la konfirmon de la virina specifeco kaj la rajton ĉeesti ĉiamedie por kunkontribuado al konstruo kaj evoluo de pli justa socio, respekte de la ĉiuhomaj rajtoj. En ĉi tiu tago oni memorigas pri la 139 virinoj mortintaj en Usono dum la striko de la 1909ª jaro.

**21** - Nawroz (Kurda Novjartago). Ĝi reelvokas la mitan heroon *Kawa*, kiu liberigis la kurdan popolon de la tiraneco. *Nawroz* signifas «nova tago». Ekde antaŭ 2600 jaroj, tiutage oni rite ekbruligas fajrojn, simbolojn de libero kaj venko. De kiam la kurda popolo estis senigita je sia patrujo, en pluraj landoj tiu celebrado estas malhelpita kaj, foje, eĉ malpermesita.


5759 Hebrea jaro

2-4 - Purim. Gaja celebrado rememore de la okazintaĵoj rakontitaj en la libro de *Esther*, kiam la hebreoj, en Persujo, estis savitaj de amasbuĉado. Tiuokaze oni disdonas donacojn al amikaro kaj monon al malriĉuloj.

2559 Budhista Jaro

3 - Kodomonohi ( Japanio). Festo de la infaninoj: en ĉiu familio, kie troviĝas infanino, oni pretigas persikfloran aranĝon kaj specon de altaro sur kiun ŝi metos siajn pupojn.

2054/5 Hinduisma jaro

1 - Holy. Unu el la plej viglaj kaj popularaj festoj de Hindio kiu signas la finon de vintro kaj alvenon de printempo. Brua kaj bunta procesio trairas vilaĝojn kaj urbojn.

21 - Hindua novjartago 2055. La datado komenciĝas ekde kiam la reĝo *Vikrama Era* enkondukis la kalendaron.

25 - Ramanavani. Ĝi rememorigas la naskiĝon de la legenda heroa reĝo *Rama*, unu el la dek enkarniĝoj de la Dio *Vishnu*. Dum la antaŭa semajno oni legas kaj prezentas lian draman vivon. Je la festo-tagiĝo, post rita purigado en akvo, oni vizitas la templon.

1999 Kristana jaro

28 - Palmodimanĉo (Anglikana, Evangelia, Katolika). Ĝi memorigas pri la eniro de Jesuo en Jerusalemon antaŭ la Pasiono. Ĉefmomento de tiu tago konsistas el bena ceremonio kaj procesioj kun olivo- aŭ palmo-branĉoj. Komenciĝas la «Sankta Semajno».

1419 Islama jaro

26 - Halto de la pilgrimuloj en la ebenaĵo de Arafat. Speciala momento de la pilgrimado al Mekko (*Hagg*), la kvina pilastro de Islamo.

27 - Aid el Kebir. Ĝi estas la plej grava festo de Islamo, kiu memorigas pri la miraklo farita de *Allah*, kiam li anstataŭigis per virŝafo la filon de Abraham, destinitan esti oferbuĉita. Sine de ĉiu familio oni kuiras tutan ŝafidon, kiu parte estas donita al malriĉuloj.

8 - Internacia festo de la virinoj. Tiu tago simbolas la konfirmon de la virina specifeco kaj la rajton ĉeesti ĉiamedie por kunkontribuado al konstruo kaj evoluo de pli justa socio, respekte de la ĉiuhomaj rajtoj. En ĉi tiu tago oni memorigas pri la 139 virinoj mortintaj en Usono dum la striko de la 1909ª jaro.

21 - Nawroz (Kurda Novjartago). Ĝi reelvokas la mitan heroon *Kawa*, kiu liberigis la kurdan popolon de la tiraneco. *Nawroz* signifas «nova tago». Ekde antaŭ 2600 jaroj, tiutage oni rite ekbruligas fajrojn, simbolojn de libero kaj venko. De kiam la kurda popolo estis senigita je sia patrujo, en pluraj landoj tiu celebrado estas malhelpita kaj, foje, eĉ malpermesita.